

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTA ★

Internacia

SEMAJNA

Neŭtrala

Abono ĉi pagas laŭ la taga kurzo de sia propra valuto, se eble per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero, aŭ per ĉeko, sed ne per poŝtmandato.

Abonantoj, kies abono estas finiĝonta, ricevas ĝustatempe admonilon.

Abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero.

Por Abono oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. — Prezo de unu numero: 0.06 dolaro, 0.15 guld., 0.24 sved. kr., 0.50 sviz. fr., 0.50 dana aŭ norvega kr., 0.50 peseto, 5/8 pencoj, 0.50 fr. aŭ belg. fr., 0.70 lito, 1.20 fmk., 1.40 ĉ. kr., 10 germ. mk. por germanoj, baltoj kaj baltanoj, 5 germ. mk. por rusoj, 12 hung. kr., 60 pol. mk., 500 aŭstr. kr.; alivalutuloj pagas samvaloron de 0.50 franc. fr. aŭ unu stampitan respond-kuponon.

Jarabono kosta la prezon de 50 n-oj (por brit. 16.811 l.). Por Adresanĝoj ni kalkulas la prezon de 2 n-oj. Liston de niaj Abonejoj en diversaj landoj vidu sur paĝo 4!

Germanoj abonu je favorprezo de sia poŝtoficejo. Dumviva Abono kosta la prezon de 400 numeroj, por malbonvalutuloj la prezon de 500 numeroj.

Precipe malbonvalutuloj **atentu** la **novajn prezojn** kaj kondiĉojn por abono kaj anonco-toj!

(Por la Opa Vendado la novaj prezoj validas nur post 1. septembro.)

Numero 98 :-: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 20. Aŭgusto 1922.

# XIV-a Univ. Kongreso de Esperanto.

1039 kongresanoj el 32 nacioj por Helsinki. Internacia Laboroficejo, Ruĝa Kruco kaj Mondligo de Internaciaj Asocioj reprezentitaj. — Antaŭ la Kongreso en Berlin, Lübeck kaj Danzig.

**Telegramo el Helsinki,**  
ricevita tuj post finpresado de nia antaŭa numero:  
1039 kongresanoj el 32 nacioj; ĉeestas ĉirkaŭ 900 personoj el 31 nacioj. Reprezentataj Laboroficejo, Ruĝa Kruco, Internaciaj Asocioj.

**Esperanto-Tagoj en Berlin.**  
la 31-an de julio kaj la 1-an de aŭgusto 1922.

La Berlina Esperanto Gruparo aranĝis okaze de la traveturo de la eksterlandaj partoprenantoj al la XIV-a mondkongreso diversajn kunvenojn en Berlin kaj Potsdam, por agrabligi al la fremdaj gastoj la restadon. Ĉirkaŭ 30 eksterlandaj ge-Esperantistoj, inter ili italaj, hispanoj, ĉeĥoj, nederlandaj, anglaj, irlandanoj, svisoj, hungaroj ktp., eĉ unu fino, renkontiĝis tie ĉi, kaj la berlinaĝa gesamsideanoj montris al ili la multajn vidindaĵojn de la grandurbo. Krome ili vizitis en Potsdam, gviditaj de la tieaj geamikoj, la tombon de Frederiko la Granda, parkon kaj kastelon Sanssouci ktp.

La 1-an de aŭgusto vespere estis en la klubejo de la Gruparo Berlin oficiala salutvespero, kiu estis vizitata de ĉirkaŭ 200 personoj, inter ili multaj ne-Esperantistoj. Post kelkaj salutvortoj de la prezidanto Direktoro Glück, la reprezentantoj de la diversaj nacioj elparolis sian dankon por la bela travivaĵo en Berlin kaj Potsdam kaj rakontis iom pri la Esperanto-movado en sia lando. Inter la fremdaj gastoj ankaŭ estis blinda samideano, Prof. D-ro Rosensteln el Kairo, kiu per hazardo aŭdis pri la internacia kunveno en Berlin kaj partoprenis en ĝi. Per senĝena kunesto en kafejo „Josty“ finiĝis la agrabla tute internacia kunveno.

La 4-an de aŭgusto franca Esp. karavano al Helsinki, gvidata de s-o Poncet, vizitis Berlinon, ĉirkaŭ 25 personoj, inter ili multaj longjaraj Esperantistoj, eĉ el Algerio, kaj ankaŭ s-o Chavet, la sekretario de la Centra Oficejo Paris. Ili veturis,


gvidataj de la delegito de UEA, s-o Schwaiger, per aŭtomobilo al Potsdam, kaj vespere estis en Berlin ne-oficiala salut-vespero en „Wilhelmshof“ kun la berlinaĝa gesamsideanoj.  
H. N.

**Antaŭkongreso en Lübeck.**  
3.—5. aŭg. 1922.

Pri ĝi ni jam donis mallongan raporton. Bedaŭrinde ni ne ricevis pluajn sciigojn kaj tial ne povas pli bone kontentigi niajn scivolemajn legantojn. Espereble ni baldaŭ povos fari tion.

**Antaŭkongreso en Danzig.**  
4.—6. aŭg. 1922.

La antaŭkongreso en Danzig okazis laŭ maniero, kiu povis kontentigi la multajn samideanojn kaj samtempe vekis grandan intereson por Esperanto inter la loĝantaro de la urbo. Jam antaŭ la malfermo inter aliaj la „Danziger Volksblatt“ enhavis longan artikolon pri historio kaj signifo de Esperanto, kaj poste tre detale kaj afable raportis pri la kongresaranĝoj. Alvenis gastoj el Hispanujo, Danujo, Aŭstralio, Ameriko, Jugoslavio, Germanlando, Ruslando kaj en du specialaj vagonaroj el Polujo. Akceptejo estis en privata loĝejo. Dum la unua tago oni rigardis la belajn de la urbo, gvidite de komplezema samideanoj. Vespere estis solena diservo en preĝejo de St. Mario. Bela vespera kanto estis en Esperanto kantata de s-ino Kuppe.



Fotobildo de la haveno de Helsinki. Laŭ desegnaĵo de Edelfelt.

Sabaton okazis oficiala salutvespero en la fame konata „Artushof“ (urba reprezentanta domo). Senatano d-ro Strunk oficiale reprezentis la senaton kaj transdonis al la kongreso la salutojn de la senato, kies prezidanto estis akceptinta la honorprezidantecon de la kongreso. Bela koncerto, kies unuopajn partojn ni ne povas detale menci, kunigis la grandan rondon en ĝoja humoro.

Tre grava por nia movado estas la granda intereso, kiun la gazetaro diverslanda havis por la kongreso. Malgranda eraro, kiun faris raportanto, nomante la kongreson „Unua Danziga Esp. kongreso“ estas pardonebla. 1912 estis en Danzig la bone vizitata kaj sufiĉe grava 7-a Germana Esperanto-Kongreso.

### Pri la Kongresaranĝo.

Kiel oni poste dum la malferma kunsido ofte menciis, la kongresaj aranĝoj estas efektive laŭdindaj: estas antaŭviditaj ĉiu paŝo, ĉiu fero, neniam mankas homoj, kiuj povos doni deziratajn informojn. Bonega estas ankaŭ la aranĝo pri diverskoloraj rubandetoj por la kongresanoj. Laŭ ili oni facile scias, ke la flavrubanduloj — neesperantistoj, helkongresanoj — preferu ne estu alparolataj pro nekono de Esperanto, kaj ke la helpon en okazo de embaraso pro la nekono de finna lingvo povas doni la blu-blanke ornamitaj kongresanoj, enlanduloj. — Tute prave oni diris ankaŭ,

ke la kongreslibro estas modela, enhavanta efektive ĉion bezonan por la kongreso mem kaj krome multe da oficialaj dokumentoj kaj raportoj ege interesaj. —

Ĉe la alveno en la urbon — se la tempo de l' alveno estis konata al la L. K. K. — oni jam sentas la zorgemecon de la aranĝintoj de la XIV-a: estas disdonataj al ĉiu alveninto pakajeto enhavanta: la 11-an kongresan komunikon kun urĝaj instrukcioj plenumendaj, planon de Helsinki, sur kiu estas numeritaj la lokoj kaj ejoj vizitotaj dum la kongreso, laŭ speciala almetita listo, kaj ankaŭ notita la adreso de la estonta loĝejo. La revizio de la pasportoj kaj la esploro de la valizoj pasas rapide ĉe l' montrado de kongreskarto kaj specialaj numeroj, kiujn ĉiu kongresano gluas sur la pakojn. Tiaj valizoj do povas esti transdonataj al iu ajn flakristo, kiu laŭ la numero de l' kongresano veturigos ilin al la loĝejo de l' kongresano samideano. En ĉio sentigas la zorgema laboro de L. K. K. pensinta pri la plej detalaj bonaranĝoj.

### Mardo (8. aŭg.), antaŭtagmeze.

Parto de la kongresanoj alveturis jam vendrede al Helsinki, la plejparto alvenis lunde, la lastaj mardo vespere.

La unua tago, neoficiala, pasis preskaŭ ekskluzive en lastaj antaŭlaboroj por la kongreso. Plej vizitata certe estis la akceptejo troviĝanta en la ĉefa kongresejo, la Eta Domo (Malnova Parlamentejo), afable disponigita de la finna registaro por tiu celo. Preskaŭ la tuta domo estas nun okupata de la kongresaj aranĝoj: en la mal-supra etaĝo — la akceptejo, vendado de biletoj por diversaj dumkongresaj amuzoj: teatro, koncertoj, komuna tagmanĝo, la babilo; en la supra etaĝo — la sekretariejo, telefono, telegrafo, poŝto, banko kaj ejoj por diversaj fakaj kunsidoj. La ĉefa kongresejo, lokita en la mezo de la urbo, estas belege ornamita de Esp. standardo kaj de multnombraj flagoj diverslandaj, donantaj al la konstruado vere festan aspekton kaj altirantaj la atenton de la preterpasantoj. La tuta antaŭtag

**Kvin poemoj proze.**  
De Baudelaire,  
el franca lingvo Esperantigitaj de Paul Lobut, Paris.

**La bonfaroj de la luno.**  
La luno, kiu estas la kaprico mem, rigardis tra la fenestro, dum vi dormadis en via luliĵo, kaj ekpensis: „Tiu infanino plaĉas al mi.“  
Kaj ĝi malsupreniris dolĉe sian ŝtuparon nuban, kaj trapasas senbrue la vitrojn. Poste, ĝi sin sterna super vi kun la karesemo de patrino, kaj demetis siajn kolorojn sur vian vizagon. De tio viaj iris restis verdaj, kaj viaj vangoj eksterordinare palaj. Longtempe rigardante tiun vizitanton, viaj okuloj tiel strange pligrandiĝis; kaj ĝi vin tiel ameme prenis je la gorgo, ke vi por ĉiam konservis la deziron plori.  
Dume, je l' ekspansio de sia juĝo, la luno tute okupis la ĉambron, kiel atmosfero fosforeca, kiel luma veneno. Kaj tiu tuta lumo vivanta pensis kaj diris: „Eterne vi spertos la influon de mia kiso. Vi estos bela miamaniere. Vi amos tion, kion amas mi, kaj kio amas min: akvo, nuboj, silento kaj nokto; maro vastega kaj verda; akvo senforma kaj multforma, loko, en kiu vi ne estos; amanto, kiu vi ne konos; floroj monstraj; parfumo, kiuj delirigas; katoj, kiuj svenetas sur la planoj kaj ĝemas same kiel virinoj per voĉo rauka kaj dolĉa!  
„Kaj vi estos amata de amantoj miaj, amindumata de amindumantoj miaj. Vi estos reĝino de l' viroj verdokulaj, kies gorgon mi ankaŭ premis ĉe miaj karesoj noktaj; de tiuj, kiuj amas la maron vastegan, tumultan kaj verdan, akvon senforman kaj multforman, la lokon, en kiu ili ne estas, la virinon, kiu ili ne konas, la florojn malbonsignajn, kiuj similas al incensiloj de nekonata religio, la

parfumojn, kiuj malklarigas la volon, kaj la bestojn sovaĝajn kaj voluptemajn, kiuj estas la emblemoj de ilia frenezeco.“  
Kaj pro tio, malbenata kara infanino dorlotata, mi nune kuŝas je viaj piedoj, serĉante en via tuta persono la rebrilon de la timinda diaĵo, de l' fatala prezentanto, de la nutritisto veneninta ĉiujn „lunemulojn“!  
La fremdulo.  
„Kion vi amas plej bone, homo enigma, diru? Vian patron, vian patrinon, vian fratinojn, vian fratojn?“  
„Mi havas nek patron, nek patrinon, nek fratinojn, nek fratojn.“  
„Vian amikojn?“  
De tiu vorto, kiun vi uzis, la senco ĝis nun restis nekonata de mi.“  
„Vian patrolandon?“  
„Mi nescias, je kiu larĝo ĝi kuŝas.“  
„La belecon?“  
„Mi volonte ĝin amas, se deino kaj senmorta ĝi estas.“  
„Oron?“  
„Mi ĝin malamas, same kiel vi malamas Dion.“  
„He! Kion do vi amas, ekslerinda fremdulo?“  
„Mi amas la nubojn... la nubojn trapasantajn... malĉiite... la mirindajn nubojn!“  
La bela Doroteo.  
La suno superŝutas la urbon per sia lumo rekta kaj terura: la sablo kvazaŭ blindigas; kaj la maro novrebriilas. La homoj, narkotataj fleksigas senenergie je tagmeza dormo, dormo, kiu estas kvazaŭa morto plaĉega, en kiu la dormanto, duonvekata, gustumas la voluptojn de sia nenigado.  
Tamen Doroteo, forta kaj flera kiel la suno, antaŭeniras sur la strato senviva, kiel sola viv-

antaĵo je tiu horo sub la senlima lazuro, kaj farante sur la lumo makulon brilegan kaj nigran.  
Si antaŭeniras, balancante malenergie sian torson tiel maldikan sur siaj koskoj tiel larĝaj. Sia silka robo ĝustege alfarita, je tona hela kaj rozkolora, vigne kontrastas kun la mallumo de sia haŭto kaj muldas ŝian buston longan, ŝian kavetan dorson kaj ŝian pintan bruston.  
Ŝia ruĝa sunombrelo, mildigante la lumon, jetas sur ŝian vizagon malhelan, la sangan koloron de siaj rebriloj.  
La pezo de ŝia masa hararo preskaŭ blua, tiras posten ŝian kapon delikatan kaj ŝin aspektigas triumfanta kaj malpenema. Pezaj ornampendaĵoj flustras sekrete ĉe ŝiaj oreloj ĉarmaj.  
De tempo al tempo, la mara vento levetas flanke ŝian jupon kaj vidigas ŝian kruron rebriĝan kaj belegan; kaj ŝia piedo, simila je la piedo de la deinoj marmoraj, kiujn Eŭropo fermas en siajn muzeojn, stampas fidele sian formon sur la sablon eretan. Ĉar Doroteo estas tiel mireginde koketa, ke la plezuro esti admirata superas je ŝi la malhumilecon de l' ekssklavino, kaj malgraŭ ke ŝi estas liberigita, ŝi paŝas sen ŝuoj.  
Si antaŭeniras tiel, harmonie, feliĉa vivi, kaj riderante je blanka rideo; kvazaŭ ŝi ekvidus malproksime en la spaco spegulon reflektantan ŝian paŝadon kaj ŝian belecon.  
Je la horo, kiam eĉ la hundoj ĝemas pro doloro sub la suno, kiu ilin mordas, kia potenco motivo irigas tiel la malpeneman Doroteon, belan kaj malvarman kiel bronzo?  
Kial ŝi forlasis sian etan kabanon tiel kokete aranĝitan, kiun floroj kaj matoj tiel senpene igis perfekta buduaro; kie ŝi havas tiel grandan plezuron, kombante sin, fumante, ventumigante sin, kaj sin rigardante en la spegulo de siaj grandaj ventumiloj plumaj, dum la maro, kiu batas la

terbordon je cent paŝoj de tie, faras akompanadon potenca kaj unutonon al ŝiaj malprecizaj revadoj, kaj la fera kaldrono, kie kuiras krabsaŭcaĵo kun rizo kaj safrano, sendas al ŝi, el la fundo de l' korto, siajn parfumojn stimulaĵojn?  
Eble ŝi interkonsentis rendezuon kun iu oficio juna, kiu, sur malproksimaj marbordoj, aŭdis de sia kamaradoj pri la bela Doroteo. Nepe ŝi simpla persono petos lin, priskribi al ŝi la balojn en la Operejo, kaj demandas al li, ĉu oni povas iri tien nudpiede, kiel ĉe la dancoj dimanĉaj, kie eĉ la maljunaj kafirinoj iĝas ebriaj kaj ardegal pro ĝojo, kaj plue, ĉu la belaj virinoj Parizanaĵ estas ĉiuj pli belaj ol ŝi.  
Doroteo estas admirata kaj dorlotata de ĉiuj, kaj ŝi estus perfekte feliĉa, se ŝi estus ne devigita amasigi piastron sur pastro por reaĉeti sian fratineton, kiu ja havas dekunu jarojn, kaj jam estas matura, kaj tiel bela! Ŝi sukcesos sendube, la bona Doroteo; la mastro de l' knabino estas tiel avara, tro avara por komprent alian belecon ol tiun de l' moneroj.  
Jam!  
Centfoje jam, la suno elsprucis, ĝojradia aŭ malĝojigita, el tiu vastega kuvo de l' maro, kies bordoj nur apenaŭ vidigas; centfoje, brilega aŭ malgaiema, ĝi resubakvigis en sian vastegan vesperbanon. De nemal multe da tagoj, ni povis rigardadi la parton alian de l' firmamento kaj deĉifri la ĉielan alfabeton de l' antipodoj. Kaj ĉiu pasaĝero estis ĝemanta kaj grumbanta. Sajnla, kvaz ŝi iliaj doloroj estus intensigitaj de l' alproksimiĝo al tero. „Kiam do,“ ili diris, „ni ĉesos havi dormon skuatan de ondegilo, interrompitan de vento ronkanta pli laŭte ol ni? Kiam ni povos digesti en brakseĝo senmova?“



mezo pasis, kiel dirite, en laŭnaciaj kunvenoj, aranĝitaj por la anoj de diversaj nacioj, por ke ili povu pridiskuti demandojn gravajn por ili. Dum ĉi tiuj kunvenoj la nacioj plej multnombro reprezentataj havis la taskon elekti vicprezidanton por la XIV-a (v. kongreslibro p. 75).

## Mardo (8. aŭg.), posttagmeze.

En ĉi tiu vespero estis aranĝita la tiel nomata „Interkanta Vespero“ en la Artpalaco Stenman, kies belaj, artaj ejoj rapide pleniĝis per tre diverseca vizitantoj. Estis nenia speciala programo, se ne oni kalkulas la finajn kantojn de bona horo kaj la dancojn aranĝitajn: oni havis la eblecon persone interkonatiĝi kun siaj neniam viditaj gekorespondantoj, kun multe da aliaj gesamideanoj ĝis nun nekonataj, kore premi la manojn al la malnovaj amikoj de l' tempoj de l' antaŭaj kongresoj.

## Merkredo (9. aŭg.), matene.

Diservo en la alta, aparte bela „Rokpreĝejo“. Multnombro vizitita. Altarservo: H. Dawtry (anglo) kaj E. Penttinen (finno); prediko: H. J. Pätiälä (finno).

### Solena Malferma Kunsido en Nacia Teatro (merkredon, 9. aŭg. 22).

Post aŭdo de himnoj „Finnlandia“ kaj „La Espero“ luditaj de la hornorkesto, s-o V. Loimaranta, ministro de instruado de Finnlando, malfermas la XIV-an Universalan Kongreson de Esperanto. Per afablaj vortoj en finna lingvo, tradukitaj de s-o Setälä, li bondeziras la kongreson kaj finas per kelkaj malfermaj paroloj en Esperanto. S-o T. Mabon Warden, prezidanto de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, prezentas al la voĉdono la jenan estraron de la kongreso: Prezidanto: K. von Frenckell.

Vicprezidantoj: A. Sandström D-ro E. Privat.

Naciaj vicprezidantoj:

Estonio: H. Sakaria  
Britujo: John Merchant  
Ĉeĥoslovakio: A. Pitlik  
Germanujo: D-ro Arnhold  
Polujo: Essigman.

Ĝenerala Sekretario: Gabriel Chavet.

Sekretarioj: V. Setälä  
H. Jakob.

Helsekretarioj: F-ino Elli Ahlström  
Ilmari Ekström  
Aarne Selinhelmo.

Ĉiuj nomoj de tiu ĉi estraro estas aplaŭde akceptataj. S-o Karl von Frenckell prenas la prezidantecon. Li proponas danki la Lokan Kongresan Komitaton por ĝia granda kaj bona antaŭkongresa laboro; li ankaŭ dankas je la nomo de la kongreso s-on Ståhlberg, prezidanton de la Finna Respubliko. S-o von Frenckell parolas en finna lingvo pri la enkonduko de Esp. en la lernejoj kaj svede pri la komerca praktikilo de Esp. Li deziras koran bonvenon al la kongreso en la nomo de la finnlanda Esperantistaro. Li salutas la edzinon de nia Majstro kaj dankas ŝin, ke ŝi bonvolis partopreni en la kongreso, kaj finas per varmaj vortoj de homaro kaj finna konvinko pri la bonsukceso de nia afero.

S-o Profesoro E. N. Setälä prezentas festan paroladon pri demando de Lingvo Internacia. La prezidanto dankas lin kaj rimarkigas, ke la parolado de tiu ĉi fama sciencisto kaj filologo donis al ni valorajn argumentojn por kontraŭbatali la ankoraŭ ekzistantajn dubojn pri „artefarita“ lingvo.

La Ĝenerala Sekretario komunikas saluttelegramojn, inter ili de Generalo Sebert, honora prezidanto de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, de la gefiloj de nia Majstro, de la ambasadoro de Estonio s-o Akel (en Esperanto) kaj

de samideanoj de Nova Gvineo. La prezidanto proponas, kaj la kongreso aprobas la sendon de telegramoj al s-o Prezidanto de la Finna Respubliko, al s-o Ramstedt, finna sendito en Tokio, pioniro de Esperanto en sia lando, al Generalo Sebert, al la Ligo de Nacioj kaj al la Internacia Labor-Oficejo en Genève.

Kun streĉa atento kaj ekstrema silento la ĉeestantoj aŭdis „Festan Runon“, verkitan de nia eminenta poeto D-ro Kalocsay laŭ antikvaj motivoj. Entuziasma aplaŭdo dankis la verkinton.

La prezidanto dankante lin diras, ke oni ne plu povas diri, ke Esperanto ne taŭgas por poezio.

Poste venas festa parolado de D-ro Privat.

Li unue rimarkigas, ke Finnlando estas la unua ŝtato, kie nia movado renkontis oficialan atenton de la parlamento. Li respondas la diversajn kritikojn pri la neparolebleco de nia lingvo kaj pri la kredoj, ke nia movado celas la detruon de la naciaj kulturoj kaj disigon inter lingvo kaj patrujo. Li difinas la Esperantan kulturon bazitan sur la respekto kaj amo de la diversaj nacioj kaj kulturoj, sur la reciproka interhoma fratiĝo, kaj li konkludas, ke eĉ ofero de vivo por nia celo estas ne tro multa.

Post viglaj aplaŭdoj la prezidanto dankas nian elokvantan oratoron kaj komunikas la jenan liston de oficialaj delegitoj:

Por:

Internacia Labora Oficejo (Genève): s-o Tarelli.  
Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco (Genève): s-o Rodolfo Horner.

Unuigo de Internaciaj Asocioj (Bruxelles): s-o Hendrickx.

Ministro de Publika Instruado de Bulgarujo: s-o Krum Mladjov.

Ministro de Publika Instruado de Ĉeĥoslovakio: s-o Profesoro Stejskal.

Ministro de Klerigado de Estonio: s-o V. Vaher.  
Ministro de Internaj Aferoj de Germanujo: s-o Prof. D-ro Dietterle.

Ministro de Publika Instruado de Litovio: s-o L. Alseika.

Ministro de Publika Instruado de Hispanujo: s-o Felix Diez.

Ministro de Publika Instruado de Nederlando: s-o Isbrücker.

Ĉefa Inspekcio Fervoja de Ruslando: s-o Valentinov.

Registaro de Urugvajo: s-o Enrique Legrand.  
Urbo Milano (Urbestro D-ro Filippetti): s-o I. Piatti.

La jenaj foiroj:

Foiro de Finnlando: s-o K. Ojala.

Foiro de Frankfurt a. M.: s-o R. Kreuz.

Foiro de Leipzig: s-o Dietterle.

Foiro de Praha: s-o Pitlik.

Post la salutaj paroloj de supraj reprezentantoj de organizoj la Ĝenerala Sekretario komunikas la liston de la elektitaj naciaj Delegitoj:

Aŭstrio: s-o D-ro Heinz Fiby.

Aŭstralazio: s-o George Gordon.

Belgujo: s-o Jan Jacobs.

Britujo: s-o H. Moy Thomas.

Skota lingvo: f-ino Jane Baird.

Kimra lingvo: s-o Jack Edwards.

Bulgarujo: s-o Krum Mladjov.

Ĉeĥoslovakio: f-ino Božena Vickova.

Germana lingvo: s-o Gust. Scholze.

Slovaka lingvo: s-o Eduard Gazdik.

Hungara lingvo: s-o Bareno Pál.

Danlando: s-o Martin Bilcher.

Estonio: s-o V. Vaher.

Finnlando: Finna lingvo: s-o V. Setälä.

Sveda lingvo: s-o Monsen.

Franco: s-o Vanverts.

Algerio: s-ino Figuières.

Germanujo: Kreuz (Ranf).

Hispanujo: Felix Diez.

Hungarujo: Paŭlo Balkányi.

## Je la unua matene.

Fine! Sola! Nenio plu aŭdiĝas krom la rubro de kelkaj flakroj malfruiĝintaj kaj lacegaj. Dum kelkaj horoj, silenton ni posedos, se ne trankvilecon. Fine! la traneco de l' homa vizaĝo malaperis, kaj mi ne plu suferos krom per mi mem.

Fine! Mi do povas mallaciĝi en bano de malumo! Unue, duoblan ŝtosadon je la seruro! Ŝajnas al mi, ke tio pliligos mian izolecon kaj fortigos la barilojn, kiuj nune min apartigas de l' mondo.

Abomeninda vivo! Abomeninda urbo! Ni resumu la tagon: Estis vidinta kelkajn beletristlikistojn, el kiuj unu min demandis, ĉu oni povas iri Ruslandon tervoje (sendube li kredis, ke Ruslando estas insulo); estis diskutinta longdaŭre kun direktoro de revuo, kiu, post ĉiu kontraŭparolo, respondadis: „Tie ĉi estas la patrio de l' honestuloj!“, kio logike entenas, ke ĉiuj ĵurnaloj estas redaktitaj de friponoj; estis salutinta ĉirkaŭ dudek personojn, el kiuj dekkvin estas nekonataj de mi; estis manpremita je la sama proporco, kaj tio sen antaŭzorgo; estis aĉetinta gantojn; estis iranta, por pasigi la tempon, ĉe salistino, kiu min petis desegni por ŝi kostumon Venusan; estis flatuminta teatrodirektoron, kiu min forinvetante, diris: „Mi konsilas al vi, turnu vin al s-o Z...“; li estas la plej mallerta, la plej stulta, la plej fama el ĉiuj miaj aŭtoroj; kun li vi eble sukcesos; vizitu lin, kaj poste ni ekzamenos la aferon“; estis min glorinta (kial?) pri kelkaj malbonfaroj, kiujn mi neniam faris, kaj estis malкураĝe neinta kelkajn aliajn malbonfarojn, kiujn mi faris ĝoje, — puninda fanfaronado, kaj krimeto pro moktimo; estis rifuzinta al amiko servon facile fareblan, kaj doninta rekomendon skribitan al perfekta sentaŭgulo; ha, fine! ĉu estas vere finita?

Italujo: G. Saggiari.

Japanujo: Narita.

Jugoslavio: K. Klajić.

Kroata lingvo: D-ro Maruzzi.

Latvujo: Strazde.

Nederlando: S-ino Isbrücker.

Norvegujo: Honoratus Bonnevie.

Polujo: D-ro Emil Loth (S. Essigmann).

Rusujo: Mikael Valentinov (Nikolao Mendenov).

Svedujo: P. Nylén.

Svisujo: Josi Maria Arago.

Ukrainio: Jurij Solytkievic.

Urugvajo: Enrique Legrand.

Usono: John Pellet.

Post la salutparoloj de tiuj naciaj Delegitoj kaj aŭdado de marŝo la prezidanto fermas la kunsidon je la 15-a horo.

(Daŭrigota.)

Koncerne la koncentrigon de la Esperantistoj en unu tutmonda

### Oficiala Esperantista Organizo

la kongreso diskutis planon, kiu antaŭvidas: 1. Konstantan Repraesentaron de la Naciaj Societoj (KR), 2. Internacian asocion de individualaj Esperantistoj (IEA), kaj 3. fakajn societojn.

KR kaj IEA interkonsentu pri elekto de Centra Esp. Komitato (CEK), konsistanta el ses anoj. — Lingva Komitato (LK) kaj ĝia Akademio estu sendependaj, sed la naciaj societoj, IEA kaj la fakaj societoj rajtu prezenti kandidatojn por ĝi. — CEK decidu pri okazigo de Universalaj Kongresoj kaj komistu ilian organizon al Konstanta Kongresa Komisiono (KKK).

Detalojn oni trovos en nia venonta numero.

## IX-a Bulgara Esperanto-Kongreso.

La IX-a Bulgara Esp.-Kongreso malfermiĝis la 6. aŭgusto, matene 10 h, en la plej vasta aŭditoro de la Universitato en Sofia, per la prezidanto de Bulg. Esp. Soc. La aglonego estis plenplena: ĉeestis ĉ. 500 personoj, inter ili dek jugoslavaj samideanoj el Zagreb. Saluts la kongreson la reprezentanto de l' Ministro de Popola Instruado s-o Balabanof, ĉefo de l' kulturfako ĉe la Ministerio, kiu legis leteron, per kiu la ministro deklaras sian kredon je Esperanto kaj sian estontan helpon al la movado. Nome de Zagrebaj samideanoj saluts s-o Stefankovic.

Posttagmeze la sekretario de BES legis la jarraporton. Laŭ ĝi al la Societo nun aliĝis 22 lokaj grupoj (en antaŭa jaro nur 12) kun 550 regulaj membroj; la nombro de ĉiuj grupoj en la lando superas 30. Esperanto estas instruata en 25 gimnazioj de 25 lektoroj; entute ekzistas 30 klasoj kun 784 lernantoj finintaj la lecionojn.

Okazis subkongreso de Esp. junuloj organizitaj en Gejunulara Esp. Ligo, kaj konferenco de Esp. lektoroj, kiu decidis peti la ministron, ke li klarigu al la direktoroj de gimnazioj la fakultativan instruadon de Esperanto, t.e. la enskribiĝo estu nedeviga; sed la lernado de lernantoj foje enskribiĝintaj estu deviga, same kiel ĉe matematiko; oni volas ankaŭ peti plilaligon de l' salajro pagata al Esp. lektoroj.

Fakkunvenoj okazis de komunistoj kaj vegetaranoj, ankaŭ de verkistoj kaj traduktistoj.

Dimanche estis komuna vespermanĝo partoprenata de 80 kongresanoj kaj de la gastoj el Zagreb. Lunde la verkistoj kaj traduktistoj aranĝis te-vesperon.

La 8. aŭgusto la kongreso estis fermata de la prezidanto, kiu en kelkaj vortoj esprimis la komunan deziron pri kunlaboro de balkanaj Esperantistoj, fondontaj Balkanan Esp. Ligon por komuna propagando de la lingvo kaj ideo kaj

Malkontenta pri ĉiuj kaj malkontenta pri mi, ja mi deziras min reĉeti, kaj iomete fletetiĝi meze en la silento kaj izoleco de la nokto. Animoj de tiuj, kiujn mi amis, animoj de tiuj, kiujn mi pri-kantis, forliru min, subtenu min, forliru de mi la mensogon kaj la malvirtigadojn de l' mondo; kaj vi, Sinjoro, Dio mia! donu al mi la favoron naski kelkajn belajn versojn, kiuj al mi mem pruvos, ke mi ne estas la lasta inter la homoj, ke mi ne estas malsupera al tiuj, kiujn mi malestimas.

Rimarkoj:

Charles Baudelaire (prononcu: ŝarl bodler, akcentante la lastan sillabon) estas franca poeto (1821—1867), pri kiu diris li, ke li konsistigas ligiton inter romantikistoj kaj simbolistoj, sed liaj klasigadoj neniam estas trafaj, precipe pri genioj kiel Baudelaire. Verdire, li estas nur li mem, kaj neniu sukcesis lin imiti. Jen kion pri li skribis Verlaine: „Lia profunda originaleco estas reprezentita potence kaj esence la homon modernan... kun ĝiaj sentoj akraj kaj vibrantaj, ĝia spirito dolore subtila, ĝia cerbo saturita de tabako, ĝia sango brulanta je alkoholo.“ — Krom sia ĉefverko, la poeziaro titolita „La Floroj de l' malbono“, li verkis poemojn proze, kaj tradukis majstre en francan lingvon verkojn de Edgar Poe kaj de Quincey. En liaj versoj miksiĝas plasiika kaj blida beleco kun granda kuncentrieco de penso.

Pri „lunemulo“, komparu la vortojn: france: lunatique, germane: mondsüchtig, angle: lunatic, moonstruck, ktp., kiuj havas diversajn sencojn, sed montras, ke oni ĝenerale aperlis influon mistieran de l' luno al homoj.

„flatumi“ estas uzata en la senco: peni por favorigi iun al al.

## Japanaj bopatrinoj.

La japanoj modernigiĝis ĉion laŭ eŭropa sento: armeon, komercon, industrion, modon ktp.; sed sian animon ne. Japanoj kaj japaninoj agas kaj pensas kiel siaj antaŭuloj. La lernolibro pri edukado, kiu oni enmanigis al ĉiuj juna knabino, estas la „Onna Daigacu“ verkita en la 18-a jar-

por alproksimiĝo inter la popoloj sur Falkana Duoninsulo. Saman deziron havas la arkiko el Jugoslavio kaj tiuj el Rumanio, kiuj ne povas forgesi la antaŭmilitan kunlaboron kun bulgaraj amikoj kaj kiuj bedaŭrinde ne povis ĉeesti la kongreson.

Poste fotografado kaj ekskurso al Knjajevo, bela aŭtaturbo de Sofia.

Grava sukceso de la kongreso estas, ke ĝi ekinteresiĝis la vastan publikon kaj la gazetaron. Ĉiuj ĉiutagaj ĵurnaloj senescepte donis detalajn raportojn pri ĝi kaj pri ĝia laboro dum la tri kongrestagoj. Se antaŭe ni serĉis la ĵurnalistojn, nun ili venis nin serĉi kaj ĉeestis la kunsidojn de la kongreso. D. Simeonov.

## Esperanto en Pola Lando.

BYDGOSZCZ. Post la bonaj sukcesoj dum la „Unua“, estas nun konstateblaj la unuaj „oficialaj“ venkoj en Polujo. Dank' al senlaciaj klopodoj de s-o prof. L. Kronenberg el Bydgoszcz ĉe la pola poŝta vicministro Józef Zakrzewski, dir. de la I-a departemento, aperis en la „Dziennik Urzędowy Ministerstwa Poczt i Telegrafów“ (Oficiala Gazeto de la Ministerio por Poŝto kaj Telegrafo) n-o 70 de la 7. 7. 22. oficiala komunikoj (Pr. L. 28758) rekomendanta pro la dum venonta jaro en Warszawa okazonta Esperantista mondkongreso nepran lernadon de Esperanto kaj anoncanta samtempe skriban kurson, kiu ĝis nun aliĝis jam kelkcent personoj. La gazeto estas devige legata de ĉirkaŭ 30000 polaj poŝtistoj, kaj ĉiu devas la legon atesti per sian skribo. La sama komunikoj aperis ankaŭ en la „Gazeto de l' Administrado kaj Ŝtata Polico“, konsideranta specialan kurson skriban por la oficistoj de ŝtata administrado kaj polico. — Pri la ministeria ordono skribis preskaŭ ĉiuj polujaj gazetoj plej favore, nur kelkaj „neplibonigeblaj“ esprimis sian malkontenton, Kuraĝe antaŭen!

MIŁOSŁAW. Aliĝis al la movado iama Bydgoszcz-a samideano s-o Czajka, dir. de la loka „Bank Ludowy“ (Popolbanko): La 25. 7. 22. okazis ĝenerala kunveno de „Amika Rondo Esperanta“, dum kiu s-ano Monarszynski referis pri „Esp. en la praktiko“. S-o Monarszynski gvidas sukcesplene kurson kun 15 personoj.

SIEDLCE. S-o Maurycy Lebenštejn gvidas tri elementajn kursojn por judaj gelaboristoj; entute partoprenas 36 p. Pola Esperanto Servo.

## Katolikaro.

### Internacia Katolika Laborkongreso en Luxemburg.

Internacio Katolika (IKA) kune kun Mondjunularo Katolika (MOKA) aranĝis internacian kongreson en Luxemburg la 30-an de julio ĝis 3-a de aŭgusto. Partoprenis entute pli ol 100 gravaj personoj katolikaj el 16 landoj, i. a. Preloj D-ro Gieswein, prof. Arnold, Zagreb (Svisujo), Msgr. D-ro Montero Diaz, Hispanujo, Direktoro D-ro Mack, Luxemburg, Miss Crowford, Londono, P. Philippe, Bruxelles, Grafo de Rouge, Paris, ktp. La referatoj estis farataj ĉefe en germana kaj franca lingvoj. La ĉefaj referatoj estis tradukataj Esperante. Entute multaj eminentuloj, kiuj komence estis kontraŭ Esperanto, poste konvertiĝis. La konferenco por akcepto de internacia helplingvo unuanime proponis Esperanton kiel ĉefan lingvon dum la venontaj internaciaj kongresoj de IKA kaj MOKA. La propono estis akceptita. Lia Papa Moŝto sendis koregan telegramon benante ĉiujn partoprenantojn kiel ankaŭ la laborojn de la kongreso. Hanns Sappl, Graz.

### IKUE.

Okaze de la Katolika Tago en München, Germ., estos kunveno de germanaj katolikaj Esperantistoj (IKUE) en Kath. Gesellschaftshaus, Brunnenstr. 7, Saal II, lundon la 28. aŭg., ptm. 2.30 h.

cento de filozofo Caibara Echichenn, enhavas en dudek ĉefprincipoj la devojn de virino.

Antaŭ ĉio li fiksas, ke la moralaj ecoj pli multe valoras ol la korpoj. La beleco de l' animo, li diras, estu preferata al la beleco de l' korpo. La virino, neposedanta belan animon, estas ĉiam maltrankvila estaĵo, ŝi facile koleriĝas, estas babilema, enviema kaj vanta.

En ĉapitro pri la edzeco la japana filozofo konsilas al junaj knabinoj, fari ĉion por eviti la disigon, kiu en Japanujo okazas tiel ofte.

Li konstatas sep grandajn erarojn de virinoj, kiujn li nomas la sep motivoj de l' disigo. Laŭ ili oni povas forpeli jenajn virinojn: 1. la virinojn neobeemajn al siaj bogepatroj, 2. kiuj ne naskas infanojn, 3. la voluptemajn, 4. la ĵaluzajn, 5. la tre babilemajn, 6. la sensantajn, 7. la ŝtelemajn.

Sed la plej grava malboneco estas, diras la verkisto, la malobeeco kontraŭ la bogepatroj; li ofte admonas pri tio. La virino ne forgeu saluti la bogepatrojn ĉiutage kaj -vespera. Ŝi ne estu malama kontraŭ ili, se ili ankaŭ insultas kaj batas ŝin, ĉar ŝi ne pligrandigas sian propran familion, sed la familion de siaj bogepatroj.

Nun la „Onna Daigacu“ montras la devojn de virino kontraŭ sia edzo: Ŝi neniam estu ĵaluza, ŝi ĉiam obeu liajn parencojn, ŝi multe laboru, vekturu kun la suno kaj enligiĝu malfrue. Du aferojn ŝi ne forgesu: ŝi ne vestu sin per akraj kostumoj, ne ornamu sin per frapantaj ornamaĵoj kaj ne vizitu la antaŭdiristojn kaj sorĉistojn.

El ĉi tio estas videbla, ke japanujo ne estas paradizo de l' junaj virinoj, sed de l' bogepatroj. En tiu ĉi lando oni ne mokas pri bopatrinoj.

Tradukis el pola lingvo

J. Gunia, Pířvoz.



Laŭ la nova numero de „Katolika Mondo“ Ika-grupo en Essen (Germ.) havas preskaŭ 500 membrojn; Ika-grupo en Beuthen (Germ., Silezio) havas pli ol 40 membrojn.

## Malsato en Ruslando.

Kiel ni povas helpi  
niajn samideanojn en Rusujo?

Mi ricevis leteron de la American Relief Administration, Russian Department, Wien, I, Elisabethstrasse 9. Mi estis iomete scivolema: Kion ili volas de mi? Ĝi enhavis karton, signitan de s-o Aleksandr Akkerman, Puŝkinskaja 194, Moskvo, Rusio, kun jena teksto: „Gesamideanoj, rapidu savi nin de malsata morto, necesas sebo, butero, por infanoj mielo aŭ konfitajo, fungoj, papavo, ia fortiga likvoro, sekaj fruktoj ktp.“ La karto estas signita de 12. 5. 1922.

Kompatinda samideano! Eble vi ne estas plu inter la vivantoj, kaj mia helpo venos tro malfrue. La letero enhavas krom la karto la prospekton de A. R. A. Por 10 ŝilingoj oni ebligas la transdonon de 50 funtoj da faruno, 25 f. da rizo, 20 dozoj da lakto, 10 f. da graso, 10 f. da sukero kaj 3 f. da teo. La triono de la sumo servas al la nutrigo de infanoj malsataj en Rusujo.

Mi proponas jenon. La helpado al niaj rusaj samideanoj devas esti organizata. Ĉiuj landoj, societoj, unuigoj devas kunhelpi, ne unufoje, sed ĉiam ĝis la fino de la malsato. Riĉaj unuigoj en granda urbo povas sendi ĉiunonate, eble ĉiusemajne paketon per A. R. A., precipe la landoj kun alta valuto povas helpi serioze. Tio estas vera Esperantismo, kaj antaŭenpuŝas nian movadon. Do, organizu la helpadon!

Prof. K. Trunŝchka,  
Arnaŭ, Ĉehoslo.

(Oni represigu la alvokon!)

## Polko.

S-o Chendi, redaktoro de „Politika“, grava revuo de l' policistaro rumana, interkonsentis kun la Esperantista Societo en Ĉiuj pri organizo de tutlanda propagando de policistoj kaj aranĝo de oficialaj kursoj. La revuo aperas en Ĉiuj (Rumanio), Strada Bail 3.

## Junularo.

Universala

Esperanto Asocio Junulara (U. E. A. J.)

Kio estas U. E. A. J.?

U. E. A. J. estas monduiĝo de la gejunularo. La Centra Oficejo estas: S-o A. Robin, Baugé (Maine-et-Loire) Francio.

Kian organon posedas U. E. A. J.?

La organo de U. E. A. J. estas „Esperantista Junularo“. Ĝi aperas 2-monate kaj la abono al U. E. A. J. kostas 2 franc. fr. (kotiĝo por Germ.: jare 10 gmk)

Celo de U. E. A. J.

Celo de la U. E. A. J. estas: antaŭenigi la Esp. movadon inter la gejunularo per koncentrigo de junulaj fortoj.

Delegitoj de U. E. A. J.

U. E. A. J. posedas en ĉiuj landoj delegitojn (ĉefdelegito, distrikta delegito, loka delegito). Ili donas informojn pri lokaj demandoj (ĉefdelegito por Germ.: Aleks. Hirsemann, Breslau X, Herzogstrasse 36). Distrikta delegito por Silezio (Germ.):

Erich Habellok,  
Breslau, Germ., Schleiermacherstr. 19.

## Aviadistoj Esperantistaj.

De la 3.—10. sept. okazos en Zürich (Svisujo) granda internacia flugmitingoj. Estas por la Zürichaj Esperantistoj granda plezuro, se samideanoj aviadistoj, kiuj partoprenos tiun ĉi konkurson, bonvolus anonci sin ĉe nia prezidanto E. Müller, bankoficisto, Büchlerstrasse 19, Zürich 6, por eventuala aranĝo de koniga vespero. La loka Esp. Societo klopodos laŭpove agrabli al ili la restadon en la bela urbo Zürich. K. J.

## Surd-Mutuloj.

Fakto, kiu trege mirigas min, estas, ke ne ekzistas — almenaŭ laŭ mia scio — inter la surdmutuloj tiaj internaciaj rilatoj peresperantaj, kiaj ekzistas inter la blinduloj kaj blindul-institutoj de la tuta mondo.

La surdmutuloj same kiel la blinduloj trovas grandan utilon kaj grandan ĝojon per la uzo de Esperanto. La ekono de fremdlandaj samsortuloj, de ilia animstato, vivkondiĉoj, organizaĵoj de edukado, de reciproka helpo, plivastigus la spiritan horizonton kaj eble instigus la surdmutulojn plibonigi sian vivon, imitante la limitindajn fremdlandajn. Tio estas ankaŭ prava rilato al la edukado de surdmutuloj. Internacia kunlaboro permesus studi la plej bonajn metodojn, krei ĉiajn utilajn organizaĵojn k. c.

Eble jam okazis tiaj klopodoj nekonataj de la „laikuloj“, inter kiuj mi estas.

Mi kredas ĉiuokaze, ke tiu movado — se jam ekzistanta — rajtas esti konigata, por ke ĝi estu subtenata; kaj se ĝi ne jam ekzistas, la horo alvenis por ĝin krei.

Tre interesus min ekkoni per la vojo de tiu ĉi gazeto la ideojn de la kleruloj en la surdmutula fakto.

Antwerpen, 31. Julio 1922.

M. De Ketelaere.

## Poŝto.

„Unueca Poŝta Federacio de Francio“

dissendis cirkuleron kaj demandaron al siaj galegoj de la tuta mondo kaj samtempe monatan raporton (junio) pri la agado de la Federacio. Jen praktika aplikado de Esperanto! Bedaŭrinde la kopioj enhavas multe da skriberoj. La kopioj estas haveblaj de s-o Petro Filliâtre, Paris 18, 54 rue Custine.

## Al niaj ŝuldantoj!

ET povas bone ekzistadi,

se ĉiu agento kaj revendanto regule kaj ĝustatempe pagas sian ŝuldon. Bedaŭrinde multaj estas tiel prokrastemaj, ke ni devos baldaŭ postuli garantipagon (antaŭpagon de certa sumo) de ĉiu agento kaj revendanto, kaj eventuale plialtigi la abonprezojn por ĉiuj landoj je 10—20%, se ne en la plej proksima tempo ĉiu faros sian devon; ĉar ni devas tamen reenspezi la sumojn, kiujn ni perdas per la prokrastemo de niaj ŝuldantoj.

Kun pli ol 3000 abonantoj kaj aĉetantoj ni povas kaj devas ekzistadi, kun regula eldonnombro de preskaŭ 4000 ekzempleroj ĉiusemajne nine rajtas havi deficiton. Sed ni preferus presi nur 2000 ekzemplerojn, por kiuj ni estus pagataj regule kaj por kiuj ni ricevus la plenan prezon, ol presi 4000 ekzemplerojn, por kiuj ni parte ricevas neniom kaj parte nur la duonan prezon.

Estas nia plej malagrabla tasko admoni la prokrastemulojn. Al kelkaj ni jam sendis 3—4 admonleterojn. Ke nun fine ĉiu tuj faru sian devon!

Samtempe ni dankas al tiuj agentoj kaj revendantoj, kiuj per regula kaj ĝustatempe pago plifaciligas nian ekzistadon.

## Al hungaroj!

Pro lastatempa pliboniĝo de la hungara valuto la nova prezo de ET por hungaroj provizore estos 12 kron. (ne 20), anoncetoj kostos 100 kron. (ne 160).

## Mallongaj Esp. Sciigoj.

Ĉehoslovakio.

S-o Janecka el Vítkovice gvidas kurson en burĝa lernejo Frídek-a; ĝin vizitas instruistoj kaj profesoroj. La kurso komencis la 2. 8. kaj daŭras ĉiutage duonan horon, krom dimanĉe.

Esperanto-Hejmo en Marseille (Francujo).

Esperanto-Hejmo ĵus malfermiĝis, 43 Cours Joseph Thierry. Gvidata de nia bone konata s-ano Roksano, ĝi celas fariĝi la hejmo de ĉiuj en Marseille logantaj aŭ trapasantaj Esperantistoj kaj la centro de la regiona propagando. Tie nun troviĝas la Esp. Oficejo, kiu antaŭe funkciis en tro malgranda ejo. Pile la Hejmo enhavas la delegitejon de UEA kaj la sidejon de la Esp. grupo en Marseille. La grupanoj Esp. bibliotekon entenas granda ĉambro, kie ĉiu samideano rajtos senpage legi librojn kaj gazetojn. Esperanto-Hejmo estas ĉiutage kaj tuttage malfermata. Ĝia telefona numero estas 3378. Neniu Esperantisto trapasu Marseille-on, ne vizitinte la Hejmon.

4-a Distrikta Esperanto-Tago en Friedrichshagen, Germ., 16.—17. sept. 1922.

La „Märkisch-Pommersche Esperanto-Verband“, kiu floris antaŭ la milito, nun denove devas esti vekigata. Pro tio la grupo Friedrichshagen, apartenante al Gruparo Berlin, aranĝos la 16. ĝis 17. sept. tie la 4-an Distrikatan Esperanto-Tagon, al kiu la grupoj de la provincoj Brandenburg, Pommern ktp. sendu reprezentanton! Pri la specialaĵoj de la aranĝo oni dissendas cirkulerojn al la koncernaj grupoj. Pliajn sciigojn donas s-oj Ernst Wichert, Schöneiche, Kreis Niederbarnim, kaj P. Neubarth, Berlin-Friedrichshagen, Seestr. 68.

Do, gesamideanoj, ĉu grupanoj aŭ izolitoj, venu multnombro al nia distrikta tago, por ke ankaŭ nia „Distrikta Unuigo“, en la koro de Germanujo, fariĝu tiel forta kaj vigla kiel „Revelo“ kaj „Nordalbinga Ligo“. H. N.

Verda Kato.

Estas nun la monatoj de vojaĝado. Preskaŭ ĉiusemajne la ĝajhumora pariza klubo „Amika Rondo de la Verda Kato“ havas la plezurajn akceptit traveturantajn fremdajn samideanojn. Lastatempe nin vizitis gesinjoroj Van Beck, (Holando), dum julio, kaj la 2-an de aŭgusto s-o Adalberto Smit, nederlanda propagandisto, kiu eĉ partoprenis aktive kabaretan vesperon. Ĉeestis 50 gesamideanoj, kiuj tondre aplaudis la humoran paroladon kaj la poemojn de s-o Smit. Adiaŭante li diris, ke neniam li vidis pli ĝajan klubon ol la „Verda Kato“! — Tion scias ĉiuj parizanoj. — Traveturantoj vizitu la Verdanan Katon ĉe Brasserie Andrea, 7 Rue N.-D. de Bonne-Nouvelle, Paris 2, apud la grandaj bulvaroj.

Svedujo.

Novaj kursoj okazas en Kramfors (20 p.), Vädstena kaj Väja (Ångermanlando).

Finnlando.

Lastatempe okazis kurso por komencantoj ĉe somera universitato de Jyväskylä kaj daŭrigaj kursoj en Laihia kaj Sydänmaa (30 p.).

Franclando.


Prof. Fridrich el Brno faris Esp. paroladojn pri Ĉehoslovakio en Firminy, Lyon, St. Etienne kaj Clermond-Ferrand.

Pásvalys (Litovujo).

Forveturante al la XIV-a en Helsinki, ges-oj Liudas kaj Maria Alseika havis ĉi tie la 30. julio sukcesplenan paroladon pri Esperanto. Bele aranĝita ekspozicio de Esp. literaturo kaj korespondaj vekiis grandan miron. Ĉiuj provizitaj lernolibroj kaj Esperantaĵoj estis disvendataj. Sub gvidado de s-o paroĥestro Kriščiunas organiziĝis grupo por lerni Esperanton.

Rumanio.

La Esp. vivo de Rumanio plej viglas en Cluj. Dum lasta tempo eminentaj Esp. gastoj vizitis la urbon. Post la vizito de nia japana s-ano D-ro Fujisaua (vidu ET n-o 95) dumkongrese multaj eksterlandaj gastoj estis en Cluj, inter ili D-ro Šimonek el Chicago (Usono), prof. Minkovel Sofia k. a. Nun itala s-ano D-ro Umberto Toschi, membro de l' Itala Katedro de Esperanto, prof. tekn. kaj konata Ĵurnalisto, anoncis sian viziton. Li restos en Cluj dum unu semajno.



Esperanto Inter Tramlistoj.  
La estraranoj de TUEV (Tramvojlina Unuigo Esperantista en Vieno), Julio 1922.

Kiel rezultojn de l' bonsukcesinta landa kongreso (vidu ET n-o 97) ni povas registri are komencitajn kursojn en la provinco: en Timiŝoara (Timiŝurbo) s-o F. Hügel, en Petroŝeni s-o G. Kelemen, en Odorheis-oj. Szabo, en Caransebeŝ s-o E. Toth kaj en Targo s-o Tóviŝy ekgvidis novajn kursojn.

La 56-a Kvaronjara Konferenco de la Lancashire kaj Cheshire Federacio

okazis sabaton, 22. julio, en la marurbo Southport, sub prezido de s-o J. Alker el St. Helens. La urbestirino (konsil. f-ino Hartley) bonvenigis la delegitojn per bonega parolado en Esperanto. Interalie ŝi diris, ke Esperanto estas komuna lingvo kaj havas senliman valoron por klarigi kaj solvi la multajn problemojn tutmondajn kaj konduki en granda mezuro al sankta harmonio kaj paco. Prof. Bollinson el Liverpool, kiu ĉeestis la Konferencon en Genève, parolis pri la studado de Esp. en lernejoj. S-o Merchant, prezidento de Brita Esp. Asocio ankaŭ faris mallongan paroladon pri la movado en Anglujo. S-o Applebaum el Liverpool kaj s-o Meghay el Preston estis elektataj kiel delegitoj de la Federacio al la Internacia Kongreso en Helsinki.

Dum la Kongreso de la Franca Asocio por Progreso de Sciencoj

(Association Française pour l'Avancement des Sciences) en Montpellier, fine de julio, s-o Rollet de l'Isle prezentis al la sekcio de pedagogio raporton pri la Ĝeneva konferenco.

La Kongreso de la Internacia Konsilantaro de Sciencaj Elserĉoj,

okazinta en Bruxelles fine de julio, decidis ke la plenuma komisiono studu la problemon de lingvo internacia. Ĝi konsistas el s-oj Picard, sekr. de la Franca Akademio de Sciencoj; George E. Hale, usonano; Lecomte, direktoro de la belga meteorologia observejo; Volterra, italo. Sekretario estas Schuster, anglo.

## Parolejo.

121. Pri la elparolado de Esperanto.

Estas ja sciate, ke ekz. la latina lingvo, samkiel ankaŭ la aliaj lingvoj, estas ofte tre malsame elparolataj en diversaj landoj! Ĉar estas bone kaj utile, ke la lingvo internacia estus same elparolata en la tuta mondo, mi kuraĝas kiel linno esprimi mian opinion pri tio, kio al mi persone ŝajnas modeltaŭga en koncerna rilato.

La akcentita vokalo estu elparolata duone longe, se post ĝi sekvas unu konsonanto aŭ vokalo. Ekz. gramatiko, profesie, kuraĝi.

La akcentita vokalo estu elparolata mallonge, se post ĝi sekvas du konsonantoj. Ekz. libro, mondo, razisto.

La konsonantoj k, p, l, s kaj kelkfoje ŝ estu elparolataj iom pli forte post la akcentita vokalo. Ekz. loko, kapo, pelo, kaso, paŝo. La nomitaj konsonantoj tamen ne sonu kiel duoblaj kk, pp, ll, ss kaj ŝŝ. Tia maniero klare diferencigus logon el loko, kason el kaŝo ktp.

Kelkaj vortetoj, kiel al, de, en, esti, ĵus, krom, kun, nun, per, por, pri, sub, super kaj trans estu elparolataj mallonge.

Oni ofte aŭdas tre malbelan kaj tute ne klaran elparoladon de Esperanto, kiu cetere estas tre bela lingvo. Por lerni ĝustan kaj bonan elparoladon oni legu ĉiam laŭte kaj akurate aŭskultu al bone prononcataj paroladoj, predikoj kaj prelegoj, precipe teatraĵoj, deklamoj kaj zorgema konversacio.

Se ni povas atingi proksimume saman belan prononcmanneron, ni faros pli bonan propagadon por nia afero kaj ligas nian lingvon pli ŝatata kaj pli amata de ne-Esperantistoj. Ĉe la internaciaj kunsidoj ni ankoraŭ pli bone ol ĝis nun komprenus unu la alian kaj pli kare sentus ke „ni ĉiuj estas unu familio!“ H. Šk.

## Gazetaro.

Britujo.

La grava ĉiutaga ĵurnalo „Daily Herald“, organo de la Brita Labor-Partio, konsentis publikigi komence de septembro dufoje en la semajno duonan kolonon da Esperantaĵoj; ĉiuvendrede aperos leciono pri Esp., kaj ĉiutage aperos artikoloj en aŭ pri Esperanto. Se almenaŭ unu serioza korespondanto en ĉiu lando sendos per Esp. de tempo al tempo lan novaĵon, oni povos liveri okulvideblan pruvon pri la ĵurnalista valoro de Esperanto. La novaĵa povos esti ĝenerala aŭ povos laŭvole rilati al la laboristo aŭ Esp. movado. Sendante novaĵon pri vivkondiĉoj, oni aldonu ĉiujn necesajn klarigojn; ekz. la prezo de pano k. ĉ. havas nenian signifon por alilandanoj sen sciligo pri la salajro de diversmetlaj laboristoj. Ĉiuj sendaĵoj (ordinare limigitaj je 200—500 vortoj) oni adresu al k-do P. J. Cameron, 69 Schubert Road, Putney, London S. W. 18.

Finnlando.

En Finnlanda gazetaro aperis dum majo kaj junio 98 artikoloj pri Esperanto en 82 gazetoj.

Allandaj gazetoj.

Le Journal, Paris, 7. 8. (Malfavora art.)  
L'Ere Nouvelle, Paris, 10. 8. (Pri SAT.)  
Journal du Peuple, Paris, 7. 8. (Art. por Esp.)  
Le Moniteur du Puy-de-Dôme, Clermond-Ferrand, 31. 7. (Pri Esp. propagando de ĉha prof. Fridrich.)  
L'Index des Industries du Cuir, Paris, aŭg. (Esperantlingva art. por Esp., de Prof. Aulard.)  
Le Syndicat Unique, Paris, 28. 7. (Art. tradukita el Esperanto laŭ „Sennacieca Revuo“ pri la laborista movado en Pollando.)  
La Nouvelle Revue, ĉm., Paris, 18. 7. (Stulta art. de s-o Montille.)  
Le Travail, ĉm., Verviers, Belg., 22. kaj 28. 7. (Du tre favoraj ĉefartikoloj.)  
La Flandre Libérale, Gand, Belg., 4. 8. (Malfavora art. de ĝia pariza korespondanto), 9. 8. (Protesto de la Genta Esp. Grupo kun respondo de la red.), 10. 8. (Letero de abonanto por Esp.)  
Dresdner Nachrichten, 6. 8. Art. pri Esp.-tago en la Ekspozicio.)  
Administratia Româna, oficiala organo de la rumana publiknotario, aperigis rimarkinde favoran artikolon de D-ro L. Kerner, konsilanto ĉe la R. Rum. Apelacia Kortumo en Cluj.  
Norsk Bokbinder-Tidende, Kristiania, 1. 8. (Esperantlingva art. pri norvega tarifo de librobindistoj.)  
The Sunday Star, Washington, 18. 7. (Art. pri la cirkulero de la franca ministaro por publ. instruado.)

## Slavoj-Esperantistoj.

Niaj polaj fratoj intencas inviti la XV-an en Varsovia. Mi petegas ĉiujn slavajn fratojn afable al mi scilgi, ĉu ili havus intereson, dum kongreso aranĝi kunvenon de slavoj. Mi estas konvinkita, ke ni, malkonkorda gento, povus sur tiu ĉi bazo labori por reciproka kompreno, kaj tiel montri la vojon de slava interfratiĝo. Kiu konsentas, skribu al: Boŝivoj Benetka, Jiĉin, 243, Ĉehoslovakujo.

## Redakcia Respondejo.

Al multaj. Ni nepre ne povas respondi al ĉiuj neurgaj leteroj kaj poŝtkartoj. En septembro ni espreble havos plian ofliston. Tiam ĉiuj seriozaj korespondantoj estos tuj respondataj.

Al kelkaj sendintoj de anoncetoj. Por ne malimpligi nian laboron, ni povas publikigi anoncetojn nur post antaŭpago de la tuta prezo. Bonvolu trovi la prezon sur paĝo 41.

S-o W. en N. Jarabono por poloj kostas ĝis nun 2500 kaj kostos estonte 3000 mk.; anonceto 400, estonte 500 mk.

## Ni atentigas

Je la prospekto, kiu estis aldonita al la antaŭa numero, pri „Enciklopedia Vortaro“ de s-o Wüster. Ĉar tiu verko estas eksterordinare grava, ni varme rekomendas ĝian subtenon.

## Recenzojo.

LIBROJ.

SCHRIFTEN DES FRANKFURTER MESSAMTS. Heft 8. Wirtschaft und Kultur in Mittelamerika einschließlich Mexico. (Ekonomio kaj kulturo en Meza Ameriko, inkl. Meksiklando.) Kun bonaj ilustraĵoj. Prezo 30 gmk. Havebla de Messamt Frankfurt a. M., Germ.

LUNIA LEGOLIBRO. De K Brüggemann. Universala Biblioteko n-o 1. 64 pg. 10 1/2 x 18 1/2 cm. 1922. Esp. Verlag F. Ader, Dresden A. 27. —

Ree naŝiĝis legolibro formanta la unuan volumeton de nova kolekto (U B). La deknau rakontojn, fabelojn kaj popol-legendojn, kiujn la libro enhavas, lerie tradukis nia germana samideano kaj konata recenzanto K. Brüggemann. El la amasego da bonaj legaĵoj li elektis la plej taŭgan kaj interesan. Io nova por multaj eksterlandaj Esperantistoj estas la legendoj de la fratoj Grimm ĉi tie publikigitaj. Ĝenerale oni konas nur la fabelojn; kaj la verkinto servas nin bone donante perlojn ne laŭ kutime ĉerpitaĵoj el la gazeto beletristika. — Laŭ lingva kaj stila vidpunkto la libreto estas rekomendinda, kaj ĉiu profitos legante ĝin. Nur unu demando: Kial „Estna“ anstataŭ „Estona“? (O. A. J.)

ESPERANTO. Raporto prezentita de D-ro Aarão Reis, universitata prof., al la Klubo de Inĝenieroj en Rio de Janeiro. Eldonita de la klubo kaj dissendita al ĉiuj ĝiaj membroj.

O ESPERANTO COMO LINGUA INTERNACIONAL. Parolado farita de D-ro Antonio C. de Arruda Beltrão, ĉefinĝeniero de telegrafa distrikto, okaze de la diskuto de l' projekto prezentita de D-ro Aarão Reis al la Klubo de Inĝenieroj en Rio de Janeiro. Eldonita de la klubo kaj dissendita al ĉiuj ĝiaj membroj.

GAZETOJ.

Bizantio. Majo-junio. Kun aldono: Esp. gramatiko en greka lingvo de D-ro Stamatiadis.  
Berliner Esperanto-Mitteilungen. Aŭg.  
Norvega Esperantisto. Aprilo-julio.  
Espero Teozofia. Majo-aŭg.  
Katolika Mondo. II-a kolekto, n-o 2.  
Sennacieca Revuo, kun aldono: Der Arbeiter-Esperantist, Aŭg.-sept. — Kun artikolo kaj portreto de Romain Rolland. — Entute riĉenhava numero, eldonita en kvanto de 6000 ekzempleroj.  
Esperanta Finnlando. Junio-julio. — Speciale interesa kongresa numero kun multaj bonaj artikoloj kaj belaj ilustraĵoj.  
Internacia Komercia Revuo. Julio. — Serioza, severe fakta revuo, nun promeas aperi regule el nova eldonejo Furrer & Co., Zürich, Svisl., Stampenbachstr. 69. — Favoraj abonprezoj por malbonvalutuloj.  
Esperanto-Praktiko. Julio-aŭg.  
Verda Utopio. Junio.



Eksportado Importado

JAPANA

ESPERANTA KOMERCA KORPORACIO

JOKOHAMA, JAMAŜITAÇO 80

日本エスぺラント貿易商會

輸出輸入商

横濱市山下町七十番

Korespondado ekskluzive en Esperanto

Telegrafa Adreso: Esperanto Jokohama.

Telegrafaj Kodoj: ABC Eldono 5-a, Bentley, Lieber, Western Union kaj Privata.

Oni postulu la  
Victoria-Eksport-  
preziston



en germana-hispana  
aŭ germana-angla  
lingvoj.

Nederlanda Anonima Societo  
Luksa-pano Fabrikoj  
antaŭe Henri J. Carels.  
50 Butikoj:  
Den Haag, Haarlem, Amsterdam.

Luntejo Carels

(tefo: H.A. Scharwächter)  
65 Welmarstraat, Den Haag.  
Oni parolas Esperanton.

Vestu vin

bone kaj malmultekoste!

Mi liveras bonstofajn pantalonojn ĉiuspecajn (konfektionaj kaj laŭ mezuro). Liveranto al multaj Esperantistoj. Postulu preziston kaj specimenojn de

Joh. P. Schmidt, Zittau i. Sa. 85 (Germl).



LA PLEJ LASTA ELTROVAJO!!!

LA FORNO  
„MOUSSON“

superas ĉiujn ĝisnunajn  
fornojn! Por domoj, ĉam-  
broj, oficejoj, fabrikoj ktp.  
La varmeco iras al mal-  
supre. Ĉio forbrulas. Ne  
restas videbla fumo. Plej  
granda eluzo de ĉiuj brul-  
aĵoj. Uzebla por ĉiuj hejt-  
materialoj. — Patentoj  
anonciataj en ĉiuj landoj!

Licenco doneblaj al mul-  
taj landoj por fabrikado!

Informojn peras la del. de UEA por Budapeŝt:  
Paulo Balkányi, Budapest VI, Hajos u. 15.

Abonejoj de ET

en la landoj

Aŭstra: Ferd. P. Huber, Mönchberg 5, Salzburg; por Wien: „La Esperantisto“ (d-ro E. Pfeiffer), Wien II/1, Postamt 34.  
Belga: Frans Schoofs, 48, K. Beerstraet, Antwerpen. Poŝtĉeka n-o 28420.  
Brazilia: Brazila Ligo Esperantista, Praça 15 de novembro, Rio de Janeiro.  
Bulgara: Georgi Hr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofio.  
Ĉeĥoslovaka: Otto Sklenčka, Hradec Králové. Otto Lumpe, Trautenu.  
Estonia: Est. Esp. Unuiĝo, poŝtkast 6, Tallinn.  
Finna: O.Y. Movado A/B., Kasarminkatu 30, Helsinki.  
Franca: Esp. Centra Librejo, 81 rue de Clitchey, Paris 9.  
Hispana: Konrado Doménech, Caldes de Malavella, prov. Girona, Vichy  
Catalan.  
Hungara: Paulo Balkányi, Hajos-utca 15-II-2, Budapest VI.  
Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamači, Aojama, Tokio.  
Jugoslava: D-ro Dušan Maruzzi, Zagreb, Jezuitska ul., br. 1.  
Litva: Talvaldo Indra, Riga, Pasta kaste 47.  
Litova: Paulo v. Medem, Smeliu g-ve 12, Kaunas (Kovno).  
Nederlanda: J. Ravestein jr., v. Aerssenstraat 200, 's-Gravenhage. (Poŝt-  
ĉeka konio Haag n-o 2878).  
Pola: Adolfo Oberholman, Krak.-Przedm. 10, Warszawa. (P.K.O. n-o 3128).  
— Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-  
Bromberg.  
Rumana: Esperanto-Oficejo Ĉiuj.  
Sveda: Fjörlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1.  
U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 800 Fifth Avenue, New  
York City.

Esperanto Service Corporation

„Esko“

500 Fifth Avenue New York City

Telegrafa adreso: Esperanto New-York.

Aĉeto, eksporto, importo kaj maklerado  
de ĉiuspecaj komercaĵoj.

Katalogoj, prezaroj kaj specimenoj estas danke  
ricevataj.

Por Anglujo

Ni serĉas agentejojn  
komercaĵojn  
ĉiujn ŝtalojn  
gasajn  
karbidon  
murlapetojn  
katunajn fabrikajn akcesoraĵojn:  
baldaŭ specimenojn kaj liverprezojn.

W. & R. Brierley  
Waterloo, Clitheroe  
Anglujo.

LA SENLINGVULO

ĵus aperis

Prezo (inkluzive sendkosto)

por bonvalutuloj. 180.—  
por mezbonvalutuloj 145.—  
por malbonvalutuloj 90.—

Mendu tuj, ĉar estas vendeb-  
laj nur ĉ. 350 ekzempleroj!

Butin & Jung, Godesberg, Germ.

Poŝtĉeka konto Köln 92056.

Registrita



Fabriksigno

N-o 242161

ERNST VANOLI

FREIBURG i. Br., Germ., Starkenstr. 19.

Fabrikado de novspecaj ludiloj.

Eksporto ĉiulanden. — Kapablaj reprezent-  
antoj dezirataj.

Ruslanda Esperanta Komerc-Oficejo  
„Espero“ en Moskvo

Miasnitckaja, 14.

Poŝtkesto n-o 680.

Tradukas cirkulerojn, komercajn leterojn ktp. kaj sin ŝarĝas per la dissendo de  
cirkuleroj ktp. :: Prokuras komercajn adresojn. :: Eldonante internacian adresaron  
:: :: komercan, ĝi petas sendi al ĝi katalogojn ktp. :: ::

Fondinto ALEKS. PRAGER, Prezidento  
de Komerc kaj Industria Komitato de Centra Regiono en Moskvo.

Anoncetoj.

Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj anoncetoj (nur akceptitaj por minimume du  
sinsekvaj enpresoj) kostas po du enpresoj kaj po 20 vortoj (krom unu adreso)  
0,20 dol., 0,20 fl., 1 nord. kr., 1 šil., 1 avia. fl., 1 pes., 2 franc., aŭ belg. fl.,  
3 lir., 7 fmk., 8 kc., 80 gmk., 100 hung. kr., 500 pmk., 2000 aŝtr. kr. Ĉiu  
povas pagi per lu. aŭ al la nomitaj valutoj, sed laŭ la aktuala kurzo de  
sia propra valuto, aŭ 5 stamp. resp. kup. Anoncetoj, kies valuto ne  
estas nomita, povas pagi egalvaloron de 2 franc. Ĉe rektaj abonantoj  
ni deprenas la pagon por anoncetoj laŭdezire de la abonkanto, de aliaj  
ni enpresas anoncetojn nur post antaŭpago. — Anoncetoj devas alveni  
10 tagojn antaŭ publikigo.

FIANĈIGO. — F-ino Josipa Zujčić, s-anino el Komiza-  
Pospilje, Dalmacio, kaj s-o Borivoj Beneke, konsulo de  
JKUE el Liĉin, Bohemio, informas stajn geamikojn, ke  
ili fianĉiĝis.

MORTO. Mi plenumas la malgajan devon komuniki al  
la gesamideanaro, ke mortis s-o D-ro Edmund NACHT,  
deniŝto en Jaroslava Polulo, patro de lia fervora s-ano  
Ryszard Nacht, 45 jara. En la nomo de Jaroslava  
s-anoj: L. Fischer.

DANKO. Petro Soroko en Petrograd dankas al tiu bon-  
kora samideano, kiu pagis por li abonon al ET.

SOCIALISTOJ! Brita Ligo de Esperantistaj Socialistoj  
deziras ricevi raportojn pri Esperanta kaj laborista mov-  
adoj, vivkondiĉoj kaj pri presigi en Londona tagjurnalo  
laborista Cameron, 69 Schubert Road, Putney, London  
S. W. 15

KIO DORMETAS EN VI? Sendu al mi vian naskiĝo-  
daton, profesion, iom da skribaĵo de vi kaj unu svisan  
frankon aŭ egalvaloron, kaj mi diros al vi, kion vi povas  
atlingi en via vivo. Gratologo H. Chlubna, Wien V,  
Storkgasse 12.

18-JARA GERMANO deziras korespondi per li. pl. aŭ  
leteroj kun iunaj gesamideanoj el New York, kiuj helpus  
al li perfektigi en la angla lingvo. Rekomence li helpus  
al progresintaj linstudi la germanan aŭ farus ian alian  
komplezon. Philipp Hahn bei Frau Höller, Götzen-  
kirchen-Horrem bei Köln am Rhein.

OKUPO DEZIRATA. Bonvola junulo, 18-jara, serĉas  
eksterlande oficon aŭ okupon kiel kalkulisto aŭ kore-  
spondisto. Kono de itala, franca, angla, hispana Esper-  
anta, germana lingvoj. — Skribu al Giolla Giuseppe,  
Via Ponte Seveso 50, Milano 31, Italujo.

DANKO. — Koregan dankon al ĉiuj, kiuj sendis al mi  
proponojn por infanonomo; mi elektis la nomon „Antonio“,  
laŭ cirkonstancoj la plej bona, por mia filo. A. A.  
Suerink, Platycet 96, Nederlando, Diepenveen.

LETERVESPERO. — Pola Esperantista Societo, Warszawa,  
str. Królewska 19, petas eksterlandajn samideanojn al-  
sendadi ilustritajn poŝtkartojn por aranĝata letervespero;  
ĉiu karto estos respondata.

RUSLANDO. Labora unuigo de artistoj kaj informejoj  
„Komplex“ (Rusujo, Petrograd, Mitavskij per, domo 5,  
al prezidanto artisto V. J. Kaĉalin) donas diversajn in-  
formojn kaj plenumas diversajn mendojn. — Interŝanĝe  
por rusaj sov. uzitaj poŝtmarkoj, rusaj papermonoj, Esp.  
eldonaĵoj, rusaj gazetoj, libroj kaj ĵurnaloj, la informejo  
petas sendi al ĝi plej novajn popularajn originalajn  
 teatraĵojn (dramoj, komedioj ktp.), librojn kaj ĵurnalojn  
pri teatra, dramaj kaj aliaj specoj de arto, en lingvoj  
Esperanta, rusa, franca, germana aŭ angla.

MIA AMIKO. — Esp. legatoj de Zamenhof, Bourlet,  
Ramstedt, Tagore, Bein, Abdul Baha, Sigemaĉu k. a. kun  
Majstra bildo. Necesega libro por ĉiu kursano. —  
100 ekz.: 5 dolaroj, 20 sv kronoj, 50 frankoj, 200 kc.,  
500 levoj. — P. Hitrow, Berlin-Charlottenburg 2, Fach 18.

Mi NE kolektas poŝtkartojn; sed al ĉiu, kiu sendos al mi  
plenan serion da nuntempaj aŭ malnovaj poŝtmarkoj  
bonstataj el sia lando, mi adresos po unu bela arvidaj-  
karto de Wien. Skribu vian adreson skribmaŝine aŭ  
skribmaŝinsimile al Marlin Klein, Doehl. Hauptstr. 14,  
Wien XIX/1, Aŭstrio, Eŭropo. (Mi estas Esperanto-  
kursestro ĉe la Vienna policanaro.)

Korespondo kaj Interŝanĝo.

Por senditaj 50—100 poŝtmarkoj vialandaj, mi sendos  
samkvante el mia aŭ aliaj landoj. Laŭdezire interŝanĝo  
de ilustr. poŝtkartoj. — H. Merdas, Bydgoszcz, ul. Garbary  
28-29, Pollando.

S-o Jozefo Wohlheimer, stud. med. Ĉiuj, Rumanio, str.  
Minerva 1114, deziras korespondi kun ĉiulandanoj pri  
universitataj aŭ aliaj aferoj, serioze.

S-o Anders Mäler, Degersjöberg, Junsele, Svedujo, deziras  
korespondadon kun ĉiulandaj Esperantistoj.

Mi deziras interŝanĝi poŝtmarkojn, kartojn kaj fotografaĵojn  
kun ĉiulandaj Esperantistoj. — J. B. E. de Koster, Amster-  
dam, Hollando, M. H. Trompstraat 23, 1-a etg.

Tiberio Hajdu, ev. fara., Banska-Bystrica, Ĉeĥoslovakio,  
deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj.

S-o Boris Vladimirov sciigas al siaj iamaj korespondantoj,  
ke li vivas kaj loĝas en Moskvo, Ruslando, Strastnoj  
boulevard, d. 8, kv. 3.

Frans Wuyts, Touwstraat 53, Antwerpen, Belgujo, deziras  
korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj kun ĉiulandanoj.

S-o Felix Roosbroeckx, orgenisto-pianisto, Kersbeek-  
straat 11, Antwerpen, Belgujo, deziras korespondi kun  
eksterlandanoj, prefere muzikistoj, se ne kun geartistoj.

Poŝtmarkojn interŝanĝas kun la tuta mondo per sam-  
nombraj germanaj poŝtmarkoj (sendu minimume 50)  
Oskar Köhler, Oelsnitz i. Vogtl., Bergstr. 3, Germanio.

S-o E. Lauwers, Lovellingsstraat 7, Antwerpen, Belgujo,  
deziras korespondi per leteroj kun ĉiulandanoj.

S-o Aleksy Weissbrodt, Nowe, ul. Zielona 6, Polio, deziras  
korespondi per ilustr., ankaŭ artistaj poŝtkartoj kaj  
interŝanĝas poŝtmarkojn kun la tuta mondo.

S-o Porcain Jozsef, Kovácsánál, Kossuth u. 25, Debrecen,  
Hungario, interŝanĝas ilustr. poŝtkartojn, leterojn, gazeto-  
jn, papermonojn, fotografaĵojn kun gesamideanoj de la  
tuta mondo.

S-o Fazekas Kalman, Pacsirta u. 5, Debrecen, Hungario,  
interŝanĝas poŝtkartojn ilustr., nedifektajn poŝtmarkojn  
kun gesamideanoj de la tuta mondo.

Fraŭlo Charlos Costa, str. Coso 55, Manresa, Hispanujo,  
deziras korespondadon kun alilandaj samideanoj per  
ilustr. poŝtkartoj

S-o Sven W. Johansson, Nygatan 32, Gislaved, Sved.,  
deziras korespondi kun ĉiulandanoj.

Alfons Vets, Steenebrug 131, Deurne (Antwerpen), Belgujo,  
deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kun samideanoj  
(precipe meblistoj) en la tuta mondo.

S-o Anatolio Volohev, Kambarskaja 48, Pambov, Rusujo,  
deziras korespondi.

Elmigrantaj hungaroj deziras korespondi kun tutmondo.  
Wilhelmo Güttel, Wien II, Aŭstrio, Franzensbrücken-  
str. 13-II-26.

F-ino Julia Strommengers, Callensstraat 8, Berchem apud  
Antwerpen, Belgujo, 19-jara studentino, deziras kore-  
spondi per poŝtkartoj ilustr. kun ĉiulandanoj.

Sendu al mi 50—100 malsamajn vialandajn poŝtmarkojn;  
ŝanĝe vi ricevos poŝtmarkojn el Italio, Kolonioj, Flume,  
Malta, San Marino. — Tausi Glaucarlo, Via Monforte 16,  
Milano 4, Italio.

Halldan Agnar, Dimboby, Svedio, deziras korespondi kun  
gesamideanoj el ĉiuj partoj de la terglobo.

Victor Rutland, 154, Vitzroy St., Vitzroy, Melbourne,  
Aŭstralio, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. aŭ  
leteroj kun la tuta mondo.

F-ino Maria De Ble, Oranjestraat 104, Antwerpen, Belgujo,  
studentino, deziras korespondi per poŝtkartoj kaj leteroj.

Fraŭlo Anĵonin Ivanda, fervojisto, voznj evidence, Velky  
Osek, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi per leteroj,  
poŝtkartoj ilustr. kaj interŝanĝas portretojn kun ĉiulandanoj.

Alfred Sover, Nomme, Estonio, deziras interŝanĝi poŝt-  
kartojn ilustr. kun pejzaĝoj aŭ popolokostumoj (bfl.).

Junuloj el la tuta mondo atentul! — Du 18-jaruloj (amikoj)  
deziras korespondi letere pri ĉiuj temoj. Asparuh Kon-  
stantinov kaj Teodor K. Popov en Peiric, Bulgario.

Artistino Anno Nikolaeva, Rusujo, Petrograd, Mitavskij per.  
domo 5, interŝanĝas por rusaj sov. uzitaj poŝtmarkoj,  
petas sendadi ĵurnalojn de modaj vestaĵoj de Berlino,  
Londona aŭ Pariza eldonoj.

S-o Ladislao Krausz, muzikakademia studento, Pécs, Kiraly  
str. 38, Hungario, deziras korespondi pri muziko per poŝt-  
kartoj ilustritaj kaj leteroj kun ĉiulandanoj.

Filatelistoj atentul! Kontraŭ 3 avia. fl. aŭ sama valoro mi  
sendas 100 malsamajn poŝtmarkojn grandvalore laŭ kata-  
logo. — M. J. Peukert, Herrengasse, Komotau, Ĉeĥol.

S-o L. Neukam, Pichling 68, Köflich, provinco Stirio, Aŭstrio,  
deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn (bfl.) kun gesamide-  
anoj de la tuta mondo.

S-o Edouard Jamois, 3 str. Moulin, Saint Denis, Seine,  
Franc., deziras interŝanĝi poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn  
kun gesamideanoj de ĉiuj landoj.

S-o G. Benson, Lockleys, Sud-Aŭstralio, Pierson Street,  
deziras korespondi kun gesamideanoj per poŝtkartoj kaj  
leteroj kun ĉiuj landoj.

S-o André Etienne, 54 rue du Pont, Verviers, Belg., deziras  
korespondi letere kaj poŝtkarte (ilustr.) kun eksterland-  
anoj, precipe fratinoj.

S-o A. Tenneberg (Suaeuau), Rakvere vald, Rakvere,  
Estonio, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. kun ge-  
samideanoj de ĉiuj landoj.

Du fratinoj volas korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj  
per poŝtkartoj ilustr. — F-ino Dora Pechan kaj f-ino  
Corona Pechan, Pécs, F.-malom str. 18, Hungario.